

18-taga vojaĝo al Danlando.

Estimataj Gesamideanoj,

Ni ĝojas, ke ni povas prezenti al vi la programon de vojaĝo al Danlando kun vizitoj al Hamburgo, kie ni tranĉtos kaj tagmanĝos. Sendube tiu ĉi vojaĝo tre interesos vin. Tial ni petas vin atente tralegi ĉi tiun aldonon kaj cirkuleron, kiun ni enmetis. Ni plejafable petas vin, ke vi sciigu viajn gesamklubanojn kaj aliajn gesamideanojn pri tiu ĉi vojaĝo. Pli da cirkuleroj kaj aldonoj ni volonte sendos al vi.

Karavanarangaĵoj por belg- kaj franclandanoj.

Jam kvarfoje danaj geesperantistoj invitis la tutmondan esperantistaron pasigi sian libertempon en la ĉarma Danlando. Jam partoprenis la pasintan kaj antaŭpasintan jarojn gesamideanoj el via lando, kiuj ege entuziasmiĝis pro la belegaj - de vi ne konataj- regionoj kaj tre kontentis pro la modelaj arangaĵoj. Ĉar ni jam ricevis informojn pri la ĉi-jaraj arangaĵoj, ni volonte decidis organizi por franc- kaj belglandanoj vojaĝon al la restadoj en RISSKOV kaj RY, pri kiuj restadoj vi trovos ĉiujn informojn sur la cirkuleron, kiun ni enmetis. Des pli volonte ni okupas nin pri la arangaĵo, ĉar post informoj ĉe la fervojaroj, ni povas prezenti al vi eksterordinare malaltan prezon.

La programo de la vojaĝo.

La 26-an de julio antaŭtagmeze estos la foriro de BRUSELO al Hamburgo, kie hamburgaj geesperantistoj bonvenigos nin kaj gvidos al la antaŭmendita hotelo, kie ni povos refreŝigi nin. Kvarona horo poste ni kunvenos por komuna tagmanĝo. Post tio la hamburganoj gvidos nin tra la urbo por viziti kelkajn vizitindaĵojn. Inter aliaj ni vizitos la havenon, trairos la tunelon sub la rivero Elbe, faros boatveturon sur la Alster kaj vizitos danc- aŭ amuzejon. La 27-an de julio ni forveturos al AARHUS. De tie ni aŭtobuse kun la aliaj gepartoprenontoj al la Risskov-restado veturos al la mastrumistina lernejo en Risskov, antaŭurbo de Aarhus. Sekvos ĝis la 11-a de aŭgusto la restadoj en Risskov kaj en Ry, pri kiuj vi legu la enmetitan cirkuleron. La 11-a de aŭgusto estos la forveturo de Ry al Hamburgo, kie ni same kiel antaŭe tagmanĝos, vizitos la urbon kaj reiros al la hotelo. La 12-an de aŭgusto estos la foriro de Hamburgo al Bruselo, kie ni posttagmeze alvenos, sufiĉe frue, por ke ni povu reiri la saman tagon hejmen.

La kostoj kaj la maniero de la pago.

La kostoj por la vojaĝo tien kaj returne, enklusive la komunaj elspezoj en Hamburgo sumiĝos entute nur b.fr. 675.00 aŭ f.fr. 875.00

Pro interkonsento kun la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en Hago, la pago estos por vi kiel eble plej facila. Ĝi povos okazi en la poŝtkonton, kiun havas la Cseh-Instituto en via lando. La numeroj de la Internacia Cseh-instituto de Esperanto estas : en Pariso I30090 kaj en Bruselo 350806.

Bonvolu indiki sur la pagilo : danlanda karavano

La aliĝo.

Por bona arangaĵo estas dezirinde, ke vi kiel eble plej baldaŭ aliĝos, se eble antaŭ la 15-a de majo, sed nepre antaŭ la 15-a de junio

Samtempe kun la aliĝo vi antaŭpagu 100.00 frankojn. La reston vi pagu plejlaste la 15-an de junio.

Se vi aliĝos post la 15-a de majo, vi tuj pagu la tutan vojaĝsumon. Estos eble senvalorigi la aliĝon, sed nur pro grava afero, kiu malebligos partopreni en la vojaĝo. Tiuokaze ni repagos la jam pagitan sumon je subtraho de necesaj elspezoj. Sciigoj pri senvalorigoj, kiuj atingos nin post la 1-a de julio ni ne povos akcepti. La kostoj por la restadoj vi mem pagu poste en Risskov kaj Ry.

La monvaloro.

La mensciitaj sumoj estas bazigitaj laŭ la nuna monvaloro. Okaze de grava ŝanĝiĝo estos krompago aŭ repago. Nuntempe

I dana krono	valoras	b.fr.	6.20	f.fr.	8.00
I turistmarko	"		7.00		9.00
I belga franko	"		1.00		0.77

Postaj informoj.

Dua informilo venos kiel eble plej baldaŭ post la 15-a de junio. Ĝi enhavos detalajn informojn. Intertempe ni ĉiam volonte sendos al vi la deziratajn informojn. Por cirkuleroj, informoj kaj aliĝoj vi skribu al :

S-ro T. Boersma
N. Statiestraat 155
TIELT. (Belgujo)

(-adreso E. Peltind - Quaker)